# *La monda servo de eklezioj favoras dialogon altnivelan inter Usono kaj Kubo.*




La kuba ministerio pri eksteraj rilatoj diskonigis raporton kiu emfazas ke la ekzekutiva direktoro de la monda servo de eklezioj (SMI), pastro John L. McCollough, pledis en publlika letero por elimino de la voja?limigoj al la usonaj civitanoj viziti la insulon.
La teksto diskonigita de la kuba ministerio memorigas ke la letero, anka? subskribita de la prezidanto de la eklezia konsilantaro de Kubo, pastro Joel Ortega, instigas ekskludi la insulon de la listo de ?tatoj kiuj financas terorismon.
En alia letero de la 7-a de majo de 2014, 16 gvidantoj religiaj de Usono petis al la prezidento Barack Obama impulsi dialogon altnivelan kaj krei ?ancojn por ke usonaj civitanoj subtenu la elmer?antan privatan kaj kooperativan sektoron kuban.
Aliaj petoj en la letero de la pasinta majo estis fokusitaj en la normaligo de la reciprokaj rilatoj kaj diskuti la diferencojn, kadre de respekto al digno de amba? landoj.
Aliflanke, la 26-an de septembro 2013, la pastro Richard Pates, prezidanto de la komisiono de justico internacia kaj paco de la konferenco de katolikaj episkopoj de Usono, sendis leteron al Susan Rice, asesoranto de nacia sekureco de la Blanka Domo, en kiu petis al la registaro de Barack Obama haltigi la sie?on ekonomian, la? la raporto diskonigita en Havano.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/34744-la-monda-servo-de-eklezioj-favoras-dialogon-altnivelan-inter-usono-kaj-kubo

**Radio Habana Cuba**